

# **Konciza klarigo pri la landonomoj en Esperanto**

**kun kompleta listo  
de landoj kaj landanoj**

Anna Löwenstein



La landonomoj en Esperanto estas dividitaj en du kategoriojn. Dum la daŭro de la pasinta jarcento aperis pluraj modifoj, kiuj iom komplikas la sistemon, tamen ĉiuj modifoj esence estas variaĵoj de la du bazaj kategorioj. La du-kategoria sistemo daŭre validas.

## Kategorio 1

Al ĉi tiu kategorio apartenas la plejmulto el la Esperantaj landonomoj. La radiko esprimas la nomon de la lando. Nomoj de landanoj estas derivataj de la radiko per aldono de la sufikso *-ano*.

### **Lando**

*Marok-o*

*Benin-o*

*Kolombi-o*

*Nederland-o*

### **Landano**

*marok-ano*

*benin-ano*

*kolombi-ano*

*nederland-ano*

Notu, ke la *-i-* de *Kolombio* kaj la *-land-* de *Nederlando* ne estas memstaraj sufiksoj, sed apartenas al la radiko.

## Kategorio 2

Al ĉi tiu kategorio apartenas la plejmulto el la eŭropaj landonomoj, plus pluraj aziaj kaj afrikaj. La radiko esprimas la nomon de popolo<sup>1</sup>. La nomo de la koncerna lando estas derivata de la radiko per aldono de la Fundamenta sufikso *-uj-*. Nuntempe la plejmulto de la esperantistoj preferas la neoficialan finaĵon *-io* anstataŭ *-ujo*; tamen *-ujo* estas ankoraŭ uzata kaj uzinda.

---

<sup>1</sup> Mi uzas en ĉi tiu teksto la ĝeneralajn terminojn “popolo” kaj “popolano”. La radikoj de Kategorio 2 esprimas la nomon jen de membro de popolo, gento aŭ etna grupo (*afgano*, *serbo*), jen de ano de nesendependa lando (*anglo*, *skoto*), jen de ŝtataĵo (*belgo*, *sviso*).

**Popolano**

*franc-o*  
*japan-o*  
*somal-o*

**Lando**

*Franc-ujo / Franc-io*  
*Japan-ujo / Japan-io*  
*Somal-ujo / Somal-io*

Aparta listo de ĉiuj nomoj apartenantaj al la Kategorio 2 estas aldonita en p.12.

## La finaĵo *-lando*

Iuj landonomoj finiĝantaj per *-lando* apartenas al la Kategorio 1, dum aliaj apartenas al la Kategorio 2.

**Kategorio 1:** En tiuj nomoj, *-land-* ne estas sufikso, sed apartenas al la radiko. Oni derivas la nomon de la landano regule de la radiko per aldono de la finaĵo *-ano*. (Por anoj de Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj, vidu sube la paragrafon “Landano-nomoj kaj popolnomoj”, p.6.)

**Lando**

*Gronland-o*  
*Irland-o*  
*Island-o*  
*Nederland-o*  
*Novzeland-o*  
*Togoland-o*  
*Unuiĝintaj Arabaj Emirland-oj*

**Landano**

*gronland-ano*  
*irland-ano*  
*island-ano*  
*nederland-ano*  
*novzeland-ano*  
*togoland-ano*  
*ano de UAE, emirland-ano*

**Kategorio 2:** Pro influo de la naciaj lingvoj, la finaĵo *-ujo/-io* foje estas anstataŭata de *-lando*. En siaj *Oficialaj informoj* (n-ro 11, 2009), la Akademio prezentas ses nomojn kun *-lando* anstataŭ *-ujo/-io*. Notu, tamen, ke *-lando* en tiuj okazoj estas nur variaĵo de la finaĵo *-ujo/-io*, do eblas diri ankaŭ *Finn-ujo/Finn-io*, *Pol-ujo/Pol-io* ktp. Principe eblas

anstataŭigi la finaĵon *-ujo/-io* per *-lando* en ĉiuj landonomoj de la Kategorio 2.

<b>Lando</b>	<b>Popolano</b>
<i>Finn-lando (-ujo/-io)</i>	<i>finn-o</i>
<i>Pol-lando (-ujo/-io)</i>	<i>pol-o</i>
<i>Skot-lando (-ujo/-io)</i>	<i>skot-o</i>
<i>Svazi-lando (-ujo/-io)</i>	<i>svazi-o</i>
<i>Svis-lando (-ujo/-io)</i>	<i>svis-o</i>
<i>Taj-lando (-ujo/-io)</i>	<i>taj-o</i>

## La finaĵo *-io*

Multaj esperantistoj nuntempe preferas uzi la neoficialan finaĵon *-io* anstataŭ *-ujo*. Notu, ke tio rilatas nur al landoj apartenantaj al la Kategorio 2.

**Kategorio 1:** Multaj radikoj en ĉi tiu kategorio finiĝas per *-i-*, sed kontraste kun la *-i-* en Kategorio 2, tiu *-i-* **ne** apartenas al la finaĵo sed al la radiko, kaj ne povas esti forigata. La nomo de la landano estas regule derivata de la radiko per aldono de la finaĵo *-ano*.

<b>Lando</b>	<b>Landano</b>
<i>Aŭstrali-o</i>	<i>aŭstrali-ano</i>
<i>Ĉili-o</i>	<i>ĉili-ano</i>
<i>Indonezi-o</i>	<i>indonezi-ano</i>
<i>Libi-o</i>	<i>libi-ano</i>
<i>Niĝeri-o</i>	<i>niĝeri-ano</i>

**Kategorio 2:** Multaj esperantistoj preferas anstataŭigi la finaĵon *-ujo* per la neoficiala finaĵo *-io*. Kontraste kun la *-i-* en Kategorio 1, la *-i-* de *-io-* **ne** apartenas al la radiko. Necesas forigi ĝin por derivi la popolnomon.

<b>Lando</b>	<b>Popolano</b>
<i>Aŭstr-io (aŭ Aŭstr-ujo)</i>	<i>aŭstr-o</i>
<i>Ĉin-io (aŭ Ĉin-ujo)</i>	<i>ĉin-o</i>
<i>Etiop-io (aŭ Etiop-ujo)</i>	<i>etiop-o</i>
<i>Turk-io (aŭ Turk-ujo)</i>	<i>turk-o</i>

## Transporto de landonomoj el Kategorio 2 al Kategorio 1

Eblas transporti la landonomojn de Kategorio 2 al Kategorio 1, kaj regule derivi de ili la nomon de la tieaj landanoj.

<b>Lando</b>	<b>Landano</b>
<i>Rusuj-o / Rusi-o</i>	<i>rusuj-ano / rusi-ano</i>
<i>Bosnuj-o / Bosni-o</i>	<i>bosnuj-ano / bosni-ano</i>

Tiu sistemo estas uzata precipe en multaj landoj de orient-Eŭropo, kie pluraj etnoj kunvivas en la sama lando. Tial ekzemple en Rusujo/io eblas distingi inter rusoj, kiuj estas membroj de la koncerna etna grupo, kaj rusujanoj/ rusianoj, kiuj estas civitanoj de Rusujo/Rusio, sed ne mem rusoj. Principe tiu aliro eblas por ĉiuj nomoj en Kategorio 2.

## Landano-nomoj kaj popolnomoj

Por derivi la nomon de landano aŭ de popolano de la landonomo:

**Kategorio 1:** aldonu la finaĵon *-ano* al la radiko, ekz. *Ugand-o, ugand-ano.*

**Kategorio 2:** forigu *-uj-/i-* aŭ eventuale *-land-*, ekz. *Alban-ujo/-io, alban-o; Taj-lando, taj-o.*

Se landonomo konsistas el du elementoj, por derivi la nomon de landano/popolano necesas kunigi ilin por formi kunmetaĵon. (Same kiel en ĉiuj kunmetaĵoj, la eventuala aldono de streketo aŭ kunliga vokalo estas nedeviga. La Akademia rekomendo pri landonomoj ne donas konsilon pri tiu detalo.)

	<b>Lando</b>	<b>Landano/popolano</b>
<b>Kat. 1</b>	Gvineo-Bisaŭo Sankta Lucio Sud-Afriko	gvinebisaŭano sankta-luciano sudafrikano
<b>Kat. 2</b>	Sauda Arabujo/io	saud-arabo

Ekzistas grupo de landonomoj, kiuj estas duoblaj aŭ konsistas el diverspecaj kunmetaĵoj. En tiaj okazoj, la Akademio rekomendas uzi esprimon kun la vorto *ano*.

<b>Lando</b>	<b>Landano</b>
<i>Trinidado kaj Tobago</i>	<i>ano de Trinidado kaj Tobago</i>
<i>Papuo-Nov-Gvineo</i>	<i>ano de Papuo-Nov-Gvineo</i>
<i>Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj</i>	<i>ano de Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj</i>

Por neformala uzo, precipe enkontekste, ekzistas pli simplaj, laŭkazaj solvoj.

<b>Lando</b>	<b>Landano</b>
<i>Trinidado kaj Tobago</i>	<i>trinidad-ano, tobag-ano</i>
<i>Papuo-Nov-Gvineo</i>	<i>papu-ano</i>
<i>Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj</i>	<i>emirland-ano</i>

En la ĉi-suba listo de landonomoj kaj landanoj/popolanoj (p. 9), tiuj pli simplaj solvoj estas aldonitaj en rektaj krampoj [ ]. Notu, ke tiuj estas miaj personaj proponoj kaj ne aperas en la Akademia rekomendo.

## Pledo por unueco

Neniu listo de Esperantaj landonomoj iam ajn povos plaĉi al ĉiuj esperantistoj. Ĉiam troviĝos iu, kiu opinias, ke anstataŭ Ukrainujo oni prefere diru Ukraino, aŭ ke Gronlando devus esti Grenlando. Tiaj personaj preferoj kaj opinioj kontribuis al la ĥaoso, kiu regas en Esperanto rilate al la sistemo de landonomoj, tiagrade ke multaj esperantistoj ne plu komprenas kiel ĝi funkcias. Sekve ili mem uzas erarajn formojn nekonformajn al la du-kategoria sistemo, tiel ke la konfuzo kreskas ankoraŭ pli.

La listo de landonomoj, kiu aperas en ĉi tiu libreto, estas tiu rekomendita de la Akademio de Esperanto en ties *Oficialaj informoj* (n-ro 11, 2009). Sendube ĉiu leganto trovos en ĝi iujn formojn, kiujn li aŭ ŝi ne aprobas pro unu kialo aŭ alia. Eblas nur pledi, ke oni rezignu pri siaj personaj preferoj favore al unueca sistemo akceptota de la tuta esperantistaro.

## Invito al instruistoj

La konfuzo en la landonoma sistemo ŝuldiĝas ĉefe al la duobla rolo de *-i-*, kiu apartenas jen al la radiko (en Kategorio 1), jen al la finaĵo (en Kategorio 2). Tiu konfuzo malaperas, kiam en la Kategorio 2 oni uzas la Fundamentan finaĵon *-ujo*. Tial estas dezirinde, ke la finaĵo *-ujo* estu ankoraŭ instruata por la landonomoj de Kategorio 2 en lernolibroj kaj kursoj, kun la neoficiala finaĵo *-io* prezentata kiel eventuala alternativo. Tiel lernantoj havos klaran manieron por distingi kaj memori, al kiu el la du kategorioj ĉiu landonomo apartenas. Aparta listo de la nomoj en Kategorio 2 aperas en p.12 post la plena listo de landonomoj ĉi-sube.



## Plena listo de landoj kaj landanoj / popolanoj

**Nota:** La rekomendo de la Akademio (*Oficialaj informoj* n-ro 11, 2009) rilatas nur al landonomoj. Ĝi ne traktas nomojn de landanoj/popolanoj. En la suba listo mi mem aldonis tiujn, kun la celo montri, kiel oni regule formas ilin surbaze de la landonomo. Bonvolu noti, ke en kelkaj landoj oni distingas inter la nomo de popolano kaj de ŝtatano, kiel en la ekzemploj *ruso* kontraste kun *rusuj-ano/rusi-ano*, kaj *bosno* kontraste kun *bosnuj-ano/bosni-ano*. Profundiĝi en tiu demando estas ekster la celo de ĉi tiu libreto.

### Lando: *landano* / *popolano*

Afganujo/Afganio: <i>afgano</i>	Bocvano: <i>bocvanano</i>
Albanujo/Albanio: <i>albano</i>	Bolivio: <i>boliviano</i>
Alĝerio: <i>alĝeriano</i>	Bosnujo/Bosnio kaj
Andoro: <i>andorano</i>	Hercegovino: <i>ano de Bosnujo/</i>
Anglujo/Anglio: <i>anglo</i>	<i>Bosnio kaj Hercegovino</i>
Angolo: <i>angolano</i>	Brazilo: <i>brazilano</i>
Antigvo kaj Barbudo: <i>ano de</i>	Britujo/Britio: <i>brito</i>
<i>Antigvo kaj Barbudo, [antigvano,</i>	Brunejo: <i>brunejano</i>
<i>barbudano]</i>	Bulgarujo/Bulgario: <i>bulgaro</i>
Argentino: <i>argentinano</i>	Burkino: <i>burkinano</i>
Armenujo/Armenio: <i>armeno</i>	Burundo: <i>burundano</i>
Aŭstralio: <i>aŭstraliano</i>	Butano: <i>butano</i>
Aŭstrujo/Aŭstrio: <i>aŭstro</i>	Centr-Afriko: <i>centrafrikano</i>
Azerbajĝano: <i>azerbajĝanano</i>	Ĉado: <i>ĉadano</i>
Bahamoj: <i>bahamano</i>	Ĉeĥoslovakujo/Ĉeĥoslovakio
Bangladeŝo: <i>bangladeŝano</i>	(eksa lando): <i>ĉeĥoslovako</i>
Barato <i>baratano</i> (vidu	Ĉeĥujo/Ĉeĥio: <i>ĉeĥo</i>
ankaŭ Hindujo/Hindio)	Ĉilio: <i>ĉiliano</i>
Barbado: <i>barbadano</i>	Ĉinujo/Ĉinio: <i>ĉino</i>
Barejno: <i>barejnano</i>	Danujo/Danio: <i>dano</i>
Belgujo/Belgio: <i>belgo</i>	Dominika Respubliko: <i>dominik-</i>
Belizo: <i>belizano</i>	<i>respublikano, [dominikano]</i>
Belorusujo/Belorusio: <i>beloruso</i>	Dominiko: <i>dominikano</i>
Benino: <i>beninano</i>	Ebur-Bordo: <i>eburbordano</i>
Birmo: <i>birmano</i>	Egiptujo/Egiptio: <i>egipto</i>

Ekvadoro: *ekvadorano*  
 Ekvatora Gvineo: *ekvator-  
gvineano*  
 Eritreo: *eritreano*  
 Estonujo/Estonio: *estono*  
 Etiopujo/Etiopio: *etiopo*  
 Fiĝio: *fiĝiano*  
 Filipinoj: *filipinano*  
 Finnlando: *finno*  
 Francujo/Francio: *franco*  
 Gabono: *gabonano*  
 Gambio: *gambiano*  
 Ganao: *ganaano*  
 Germanujo/Germanio: *germano*  
 Grekujo/Grekio: *greko*  
 Grenado: *grenadano*  
 Gronlando: *gronlandano*  
 Gujano: *gujanano*  
 Gvatemalo: *gvatemalano*  
 Gvineo-Bisaŭo: *gvinebisaŭano*  
 Gvineo: *gvineano*  
 Ĝibutio: *ĝibutiano*  
 Haitio: *haitiano*  
 Hindujo/Hindio: *hindo* (vidu  
 ankaŭ Barato)  
 Hispanujo/Hispanio: *hispano*  
 Honduro: *hondurano*  
 Hungarujo/Hungario: *hungaro*  
 Indonezio: *indoneziano*  
 Irako: *irakano*  
 Irano: *iranano*  
 Irlando: *irlandano*  
 Islando: *islandano*  
 Israelo: *israelano*  
 Italujo/Italio: *italo*  
 Jamajko: *jamajkano*  
 Japanujo/Japanio: *japano*  
 Jemeno: *jemenano*  
 Jordanio: *jordaniano*  
 Jugoslavujo/Jugoslavio (eksa  
 lando): *jugoslavo*  
 Kaboverdo: *kaboverdano*  
 Kamboĝo: *kamboĝano*  
 Kameruno: *kamerunano*  
 Kanado: *kanadano*  
 Kartvelujo/Kartvelio: *kartvelo*  
 Kataro: *katarano*  
 Kazaĥujo/Kazaĥio: *kazaĥo*  
 Kenjo: *kenjano*  
 Kipro: *kiprano*  
 Kirgizujo/Kirgizio: *kirgizo*  
 Kiribato: *kiribatano*  
 Kolombio: *kolombiano*  
 Komoroj: *komorano*  
 Kongo (Demokratia Respubliko  
 Kongo, Kongo Kinŝasa):  
*kongano, ano de Demokratia  
 Respubliko Kongo, [kongo-  
kinŝasano]*  
 Kongo (Respubliko Kongo,  
 Kongo Brazavila): *kongano,  
 ano de Respubliko Kongo,  
 [kongo-brazavilano]*  
 Kosovo: *kosovano*  
 Kostariko: *kostarikano*  
 Kroatujo/Kroatio: *kroato*  
 Kubo: *kubano*  
 Kuvajto: *kuvajtano*  
 Laoso: *laosano*  
 Latvujo/Latvio: *latvo*  
 Lesoto: *lesotano*  
 Libano: *libanano*  
 Liberio: *liberiano*  
 Libio: *libiano*  
 Liĥtenŝtejno: *liĥtenŝtejnano*  
 Litovujo/Litovio: *litovo*  
 Luksemburgo: *luksemburgano*  
 Madagaskaro: *madagaskarano*  
 Makedonujo/Makedonio:  
*makedono*  
 Malajzio: *malajziano*  
 Malavio: *malaviano*

Maldivoj: *maldivano*  
 Malio: *maliano*  
 Malto: *maltano*  
 Maroko: *marokano*  
 Marŝaloj: *marŝalano*  
 Maŭricio: *maŭriciano*  
 Maŭritanio: *maŭritaniano*  
 Meksiko: *meksikano*  
 Mikronezio: *mikroneziano*  
 Moldavujo/Moldavio: *moldavo*  
 Monako: *monakano*  
 Mongolujo/Mongolio: *mongolo*  
 Montenegro: *montenegrano*  
 Mozambiko: *mozambikano*  
 Namibio: *namibiano*  
 Nauro: *naurano*  
 Nederlando: *nederlandano*  
 Nepalo: *nepalano*  
 Niĝerio: *niĝeriano*  
 Niĝero: *niĝerano*  
 Nikaragvo: *nikaragvano*  
 Nord-Koreujo/Nord-Koreio: *nordkoreo*  
 Norvegujo/Norvegio: *norvego*  
 Nov-Zelando: *novzelandano*  
 Omano: *omanano*  
 Orienta Timoro: *orient-timorano*  
 Pakistano: *pakistanano*  
 Palaŭo: *palaŭano*  
 Panamo: *panamano*  
 Papuo-Nov-Gvineo: *ano de Papuo-Nov-Gvineo, [papuano]*  
 Paragvajo: *paragvajano*  
 Peruo: *peruano*  
 Pollando: *polo*  
 Portugalujo/Portugalio: *portugalo*  
 Ruando: *ruandano*  
 Rumanujo/Rumanio: *rumano*  
 Rusujo/Rusio: *ruso*  
 Salomonoj: *salomonano*  
 Salvadoro: *salvadorano*  
 Samoo: *samoano*  
 Sankta Kristoforo kaj Neviso: *ano de Sankta Kristoforo kaj Neviso, [sankta-kristoforano, nevisano]*  
 Sankta Lucio: *sankta-luciano*  
 Sankta Vincento kaj Grenadinoj: *ano de Sankta Vincento kaj Grenadinoj, [sankta-vincentano, grenadinano]*  
 Sanmarino: *sanmarinano*  
 Santomeo kaj Principeo: *ano de Santomeo kaj Principeo, [santomeano, principeano]*  
 Sauda Arabujo/Sauda Arabio: *saud-arabo*  
 Sejŝeloj: *sejŝelano*  
 Senegalo: *senegalano*  
 Serbujo/Serbio: *serbo*  
 Siberio: *siberiano*  
 Sieraleono: *sieraleonano*  
 Singapuro: *singapurano*  
 Sirio: *siriano*  
 Skotlando: *skoto*  
 Slovakujo/Slovakio: *slovako*  
 Slovenujo/Slovenio: *sloveno*  
 Somalujo/Somalia: *somalo*  
 Sovetio, Sovet-Unio (eksa lando): *sovetiano, sovetuniano*  
 Srilanko: *srilankano*  
 Sud-Afriko: *sudafrikano*  
 Sud-Koreujo/Sud-Koreio: *sudkoreo*  
 Sudano: *sudanano*  
 Surinamo: *surinamano*  
 Svazilando: *svazio*  
 Svedujo/Svedio: *svedo*  
 Svislando: *sviso*  
 Taĝikujo/Taĝikio: *taĝiko*  
 Tajlando: *tajo*

Tajvano: *tajvano*  
Tanzanio: *tanzanio*  
Togolando: *togolandano*  
Tongo: *tongano*  
Trinidado kaj Tobago: *ano de  
Trinidado kaj Tobago,  
[trinidadano, tobagano]*  
Tunizio: *tuniziano*  
Turkmenujo/Turkmenio: *turkmeno*  
Turkujo/Turkio: *turko*  
Tuvalo: *tuvalano*  
Ugando: *ugandano*  
Ukrainujo/Ukrainio: *ukraino*

Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj:  
*ano de Unuiĝintaj Arabaj  
Emirlandoj, [emirlandano]*  
Urugvajo: *urugvajano*  
Usono: *usonano*  
Uzbekujo/Uzbekio: *uzbeko*  
Vanuatuo: *vanuatuano*  
Vatikano: *vatikanano*  
Venezuelo: *venezuelano*  
Vjetnamujo/Vjetnamio:  
*vjetnamo*  
Zambio: *zambiano*  
Zimbabvo: *zimbabvano*

## Landonomoj de la Kategorio 2

Ĉiuj landonomoj de la Kategorio 2 finiĝas per *-ujo*. Por simpligi la aferon, nur tiu formo estas montrata en la suba listo, kvankam multaj esperantistoj preferas anstataŭigi *-ujo* per *-io*. En ses okazoj la Akademio rekomendas uzi alternativan formon *-lando*.

Por derivi la nomon de la popolano, sufiĉas forigi la sufikson *-uj-* (aŭ eventuale *-land-*).

### **Afriko**

Egiptujo, Etiopujo, Somalujo, Svazilando.

### **Azio**

Afganujo, Armenujo, Ĉinujo, Hindujo, Japanujo, Kartvelujo, Kazaĥujo, Kirgizujo, Koreujo, Mongolujo, Rusujo, Sauda Arabujo, Taĝikujo, Tajlando, Turkmenujo, Turkujo, Uzbekujo, Vjetnamujo.

### **Eŭropo**

Albanujo, Anglujo, Aŭstrujo, Belgujo, Belorusujo, Bosnujo, Britujo, Bulgarujo, Ĉeĥujo, Danujo, Estonujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Grekujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Kroatujo, Latvujo, Litovujo, Makedonujo, Moldavujo, Norvegujo, Pollando, Portugalujo, Rumanujo, Rusujo, Serbujo, Skotlando, Slovakujo, Slovenujo, Svedujo, Svislando, Turkujo, Ukrainujo.